“Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.”

L.L. Zamenhof,
El lia Kongresparolado
en Ĝenevo, 1906.
El *Originala verkaro*
(Leipzig, 1929),
paĝo 370.

Tago de Esperanto en Brazilo



Omage al la naskiĝtago de Zamenhof je la 15a de decembro, lokaj esperantistoj aranĝis, ke oni per grandega lummesaĝilo sur la plej grava trafikponto de Rio-de-Ĵaneiro

informis pri la ‘Tago de Esperanto’ (portugale *Dia do Esperanto*).

Transiras la 13-kilometran pontegon inter Rio-de-Ĵaneiro kaj Niterói meze 144 000 veturiloj ĉiutage.

Grava artikolo en israela revuo

En la februara numero de la prestiĝa kultura kaj mondvojaĝa revuo *Masa Ahher* (hebree ‘Alispeca vojaĝo’), aperis kvinpaĝa, ege favora artikolo pri Esperanto el la plumo de israela ĵurnalisto loĝanta en Svedio.

La artikolo estas riĉe ilustrita, i.a. per fotoj de la Univeralaj Kongresoj en Bjalistoko kaj Havano. Aldone al abundo da faktoj pri la lingvo, ĝi intervjuas esperantistojn el pluraj landoj.

“Esperanto estas kiel lingva manpremo”

La artikolo konstatas, ke “Esperanto ekzistas pli ol cent jarojn kaj ĝi daŭre evoluas. Ĝiaj parolantoj estas disigitaj en ĉiuj anguloj de la terglobo, ili estas ege aktivaj kaj produktas gazetojn, muzikon kaj teatraĵojn. Ili havas naciajn kaj internaciajn

organizaĵojn kaj ili renkontiĝas en sennombraj aranĝoj tra la tuta mondo.”

Ĝia konkluda alineo diras: “Esperanto estas kiel lingva manpremo: du personoj etendas siajn manojn je duono de la distanco inter si, farante egalan penon kompreni unu la alian. Esence Esperanto estas reala ilo por egaleco kaj kunekzisto, precize kiel Zamenhof mem priskribis la unuan Esperanto-kongreson: ‘ne renkontiĝis ĉi tie francoj kun angloj, rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj’.”

La artikolo aperis en perfekta koincido kun la Internacia Librofoiro de Jerusalemo (de la 20a ĝis la 25a de februaro), kie Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) havis budon kaj prezentis interalie sian novan kompaktdiskon *Kanti gefratoj kune*. □

Historia kromnoto

de Ian Fantom

En 2005 mi entreprenis historian esploron pri la kaŭzoj de la falado en la membronombroj de Esperanto-Asocio de Britio. La celo de tiu esplorado estis provizi per informoj, sur kiuj eblus bazi strategion por evoluigi la asocion. Mi planis fini la projekton ene de du monatoj, sed aferoj evoluis iom alie ol mi antaŭvidis.

Mi unue klarigu, ke en scienca esplorado oni akceptas la riskon en la komenco, ke aferoj evoluos en neantaŭviditan direkton, kaj se tio okazas, oni tamen defendas la laboron sendepende de la sekvoj. La historio de scienco abunde tion ilustras.

Mi komencis la esploron en majo 2005 en la Biblioteko Butler, kie mi kolektis kaj kopiis protokolojn kaj kontojn por la rilata periodo. Mi trairis centojn da protokoloj, produktante kompletajn listojn de ĉiuj protokoleraj sub dek du klasifikoj. Inter tiuj klasifikoj estis 'financoj'.

Estis de 1994 ĝis 1999 multe da parolo pri 'financa krizo', ne nur en la protokoloj, sed ankaŭ en la periodaĵoj. Specife temis pri la eluzo de la kapitalo de la asocio. Pro tio oni nuligis la kapotizojn por la federacioj, kaj fine en 1999 vendis la domon ĉe 140 Holland Park Avenue. Mia kompilaĵo de financaj protokoleraj tiam evidentigis, kiel ankaŭ raporto kaj korespondaĵoj en la periodaĵoj. Tamen estis esprimitaj kelkaj duboj. Iama honorofica sekretario Will Green opiniis, ke la asocio ja havas kapitalon por elspezi pri varbado. En la jarkunveno de 1996 laŭ la protokolo, "Will Green proponis ke estus pli taŭge, elspezi la investaĵojn je publiko, por rikolti pli da membroj, kaj pro tio pli da kotizoj" (Jarkunveno 1996-04-07), kaj pli poste li komentis en la sama kunveno,

ke oni uzu la kapitalon por varbi pli da membroj.

Paul Hewitt demandis [BE 2008 nov-dec p. 206-07] "Why do we find ourselves having to consider the sale of the Esperanto Centre? Why are we in this situation? There is no doubt in my mind that the organised movement in Britain is in serious difficulties. The indicators are legion – constantly falling membership, a large and sudden rise in subscription, the very small number of active groups, the considerable numbers of Esperantists who are not EAB members, etc.". Tiu demando kaptis la esencan ideon malantaŭ mia esplorado, kaj mi ankoraŭ ne povis respondi ĝin.


Mi eĉ trovis leteron verkitan de mi mem (BE 1999 jan-feb p. 30-1), en kiu mi skribis: "We support the association by giving subscriptions and donations, rather as we would do with Oxfam. But those at the centre have no magic way of furthering Esperanto if only they had the money. Quite the reverse – the movement seems to have been awash with money that no-one seems to know what to do with. Why haven't the federations been using their capitation allowance for campaigning for the language, for instance?"

Mi ne antaŭvidis, kiam mi komencis la esploron, trastudi

la kontojn de la asocio. Tamen en decembro 2005 mi decidis, ke necesas almenaŭ kontroli pri tiu perdo de kapitalo pri kiu oni depost 1994 parolis. Mi havis jam kompilaĵon de financaj protokoleraj, ĉar 'financo' estis unu el la klasoj de mia klasifiko kiam mi dokumentis la protokolojn. Mi sentis, ke estas tro da aferoj pri la financoj kiujn mi ne komprenas per la protokoloj; mankis detaloj. Oni protokolis demandojn sen respondoj. Tamen laŭ la dokumentaĵo la perdo de kapitalo ŝajnis esti malantaŭ ĉiuj el la ĉefaj problemoj kiujn alfrontis la asocio dum tiu periodo. Mi pensis, do, ke estus saĝe kontroli pere de la kontoj ĝuste kio okazas. Tion mi entreprenis en decembro 2005.

La tasko ne estis facila. Mi kutimas al laborado per ciferoj, sed mi ne estas kontisto. Plejparte la kapitalo ne estis evidentigita en la kontoj, sed devis esti kalkulita. Tamen rapide mi trovis surprizojn, kaj la fina rezulto estis tute neatendita. La esploro tuj ekiris en neantaŭviditan direkton.

La rezulto estis la suba grafikaĵo de kapitalo por la rilata periodo. Tiun version mi produktis en 2006 kun kontisto, sed la malneton mi produktis en



decembro 2005, kaj tuj liveris al la prezidanto kun kompleta kompilaĵo de la financaj protokoleroj, kaj resumo de la plej signifaj.

Interpreton de tiu grafikaĵo mi ne proponis; tio estas por aliaj. Mi proponis renkontiĝi kun la prezidanto por tion diskuti, ĉar eble li volus min demandi pri la esplorado, kaj ĉiukaze, mi ne dezirus ion tian publikigi sen doni al la prezidanto tempon por

konsideri kiel pritrakti ĝin, kaj ankaŭ tion mi pretis diskuti kun li.

Mi konsideris, ke per tio mia tasko rilate al la financa parto de la esplorado estas finita. Tamen el historia intereso mi nun interesiĝus pri la opinioj de membroj de la asocio pri tiu grafikaĵo. Ĉu la membroj mem povas interpreti tiun grafikaĵon? Ĉu el la tempo pasinta ni povas lerni lecionojn por la tempo estonta? □

RETE KAJ LETERE

BY E-MAIL AND LETTER

Search for Esperanto plates

Dear editor,

I am looking for one of the Esperanto plates produced some years ago. If anyone has one of these, would they like to sell? Please contact Julian Rothenstein at jr@redstonepress.co.uk or telephone 020 7352 1594.

Julian Rothenstein



Novjara saluto el Afriko

Karaj samideanoj,

Je la nomo de AO (Afrika Oficejo) de UEA, mi kaj André Gokan (parttempa volontulo ĉe AO) deziras feliĉan novan jaron 2011. Espereble la tuta afrika Esperanto-komunumo denove povas kalkuli je viaj apogoj ĉiuspecaj.

Eĥoj kadre de agado de UEA estas daŭre legeblaj en la bultenoj de la Afrika Komisiono de UEA sub la rubriko 'Bultenoj' ĉe www.esperanto-afriko.org. Tie legeblas verkoj de afrikanoj kaj eksterafrikanoj pri agadoj por kaj per Esperanto. Viaj komentoj ĉiuspecaj por progresigi la movadon afrikan estas bonvenaj ĉe AO (afrika.oficejo@gmail.com)

Dum 2011 anonciĝas buntaj agadoj: seminario en Kongo-lando, instruvojaĝo de neder-

landanoj, de svisino, aranĝo de landaj kongresoj, varbado por la interreto (www.lernu.net), kreado de retpaĝaroj por landaj asocioj ktp.

Ni kalkulas je via malavara bonvolo por realigi multnombrajn projektojn, kiuj atendas viajn apogojn ĉiuspecajn.

Jean Codjo,
membro de Afrika Komisiono
kaj respondeculo de AO



Kiel helpi al la indonezia movado?

Saluton!

Du instruvojaĝoj al Indonezio havas kiel sekvon, ke nun en pluraj insuloj estas homoj, kiuj scias pri Esperanto kaj eĉ eklernis ĝin, kaj en du urboj estas aktivaj kluboj – kaj en aliaj urboj oni provas starigi klubon aŭ almenaŭ kune lernas. Tamen la movado en Indonezio ankoraŭ nek grandas nek fortas, kaj bezonas nian helpon. Estas pluraj manieroj tion fari.

Eblas sendi librojn al la kluboj, precipe anglalingvajn lernolibrojn kaj vortarojn, sed ankaŭ bazajn librojn (ekz. *PIV*, la Fundamento aŭ malgrandaj (bild)vortaroj). Petu min pri la adresoj.

Fondaĵo Canuto

Multaj esperantistoj tra la Tria Mondo arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos al UEA teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj, ekzemple en evolulandoj.

EAB povas senpage plu-sendi vian donacon al UEA. Bonvolu klare mencii "Por Fondaĵo Canuto".

*Antaŭdankon
pro via solidareco!*

Alia ebleco estas helpi 'kanutigi' indonezianojn. Estas pli da indonezianoj, kiuj meritas fariĝi UEA-membro ol Fondaĵo Canuto povas subteni. Pluraj el tiuj indonezianoj jam sciigis al mi, ke se ne eblos ricevi papere, por ili sufiĉos ricevi retan abonon al la revuo *Esperanto*. En tiu kazo membriĝo kostas nur 12 eŭrojn kaj eblos donaci ĝin al pli da homoj. Se vi volas tion fari, bonvolu ĝiri vian subtenon al Fondaĵo Canuto kun mencio 'por indonezianoj' [*ebblas pagi al UEA senkoste pere de EAB; vidu supre*].

Alia plano estas venigi almenaŭ po unu indoneziano al Universala Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso ĉi-jare. Pluraj indonezianoj jam revas pri UK aŭ IJK, kaj pretas mem kontribui, sed la tuta kosto estas simple tro alta por ili. Helpu al ili kaj ĝiru al la konto 'Azio' de UEA kun mencio 'indonezianoj al UK/IJK', por ke, fine, denove estu iu(j) el tiu grandega lando en niaj plej gravaj kongresoj. Antaŭdankon ilianome.

Por pliaj informoj, bonvolu retumi al: heidi.goes@gmail.com
Heidi Goes, Belgio
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Heidi_Goes>

Books from EAB's bookshop

– a few titles that learners find helpful at various stages

• Please add 15% for postage and packing – minimum £1.50. Cheques payable to 'EAB' please, or contact Esperanto House (tel. 0845 230 1887) to pay by debit (or credit) card. Please visit the bookshop online at www.esperanto-gb.org/eab/bookcat for our full list of goods. Many more books are stocked at UEA – go to <http://katalogo.uea.org>. The EAB office can help if you wish to pay UEA and do not have an account there.



Conversational Esperanto Don Lord. Barlaston: EAB, 2008 (2nd ed.). A collection of short texts, mostly dialogues, written in lively, everyday Esperanto and designed for learners who would like to improve their fluency. £9.00

Mil unuaj vortoj Heather Amery. Translated by Edmund Grimley Evans. Barlaston: EAB, 2004. PB, 63 p. A colourful and lively picture dictionary, ideal for children and adult beginners. Contains a wealth of Esperanto vocabulary. £8.00 (order 3 copies or more to receive a 33% rebate).

Rakontoj sub la lito Antoaneta Klubocar. Translated from the Croatian by D. Klubocar. Osiek, 2004. SB, 120 p. Twenty charming stories in largish

print, suitable for children/beginners. Colourful illustrations by a 12-year old girl. £8.60

Rat-man Leo Ortolani. Esperanto por IEJ & JEFO. 128 p. illus. A comic about an Esperanto-speaking superhero, full of nonsense humour and pop-culture references (not available from UEA). £7.00

Saluton! Audrey Childs-Mee. Rotterdam: UEA, 2002 (7th ed.). SB, 194 + 40 p. illus. 'Direct method' introductory book for self study, also suitable for groups. Key for the exercises, and index. Great fun! £9.40

Salutu la sinjorinon Tome & Janry. Tradukis S. Merlet & J Lazert. Paris: 2005. SB, 47 p. The first adventures of 'Eta Spiru' in Esperanto; Belgian comic book in the style of Asterix and Tintin. £8.70


ALIAJ LIBROJ

Metodiko de la Esperanto-instruado Rudolf Rakuša. Roterdamo: UEA, 1991 (3a eld.). 189 p. Baza pedagogia gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo. £4.75

Nemave edifi Stefan MacGill. Antverpeno: FEL, 2007. SB, 263 p., illus. Originalaj teatraĵoj, prozaĵoj kaj poemoj kun cerbo-aktivigaj ekzercoj kaj rolludoj. £14.55


Relativeco per bildoj Wilfrid Atkinson. Barlaston: EAB, 2006. SB, 104 p. Provo klarigi la esencajn ideojn de Einstein per 73 ilustraĵoj kaj diagramoj. £5.00

La skota lingvo William Auld. Glasgovo: EAS, 2007. SB, 16 p. Konciza prezento de la moderna skota. Antaŭparolo kaj aldonaj notoj de Girvan McKay. £2.50




Relativeco per bildoj

Wilfrid Atkinson



Per kompreni la esencajn ideojn de Einstein per bildoj



El la brokantejo

• Ĉiuj el la sekvaj prezroj inkluzivas la sendokostojn. Ni havas pli ol unu ekzempleron de kelkaj el la titoloj.

La besto-farmo George Orwell. El la angla tradukis Gerald Tucker. Munkeno: 1970 (2a eld.). SB, 108 p. £1,80

Blua sango Willy Wood. El la nederlanda tradukis Willy van Zoest. Romano. Nederlando: ĉ. 1965. SB, 187 p. £2,30

Bona rido Humura anekdotaro, kolektita kaj esperantigita de Axel A. Hem. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1965. SB, 85 p. £1,50

Brulanta sekreto Stefan Zweig. El la germana tradukis K.R. kaj P.E. Schwerin. Britio: 1949. SB, 158 p. Rakontoj. £1,80

Disko: ciklo de skizoj Johan Hammond Rosbach. Antaŭparolo de William Auld. Åbyhøj: Dana Esperanto-Eldonejo, 1970. Eble por kolektanto – ĉar paĝoj neniam estis tranĉitaj! Pri la ŝipo *Disko*, kiu trafikis inter Danlando kaj Gronlando. Kontrolita de la Literatura Komitato. £2,50

Dorse kontraŭ la muro P. Wybenga. El la nederlanda tradukis S.S. de Jong. Nederlando: 1967. SB, 163 p. Antologio de inspirigaj rakontoj pri la rezistomovado en Frislando kontraŭ naziismo. £1,90

D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde R.L. Stevenson. El la angla tradukis A. Goodheir. Glasgovo: Kardo, 1980. SB, 67 p. £1,90

La du turegoj J.R.R. Tolkein. El la angla tradukis W. Auld. Jekaterinaberg: Sezonoj, 1996. HB, 430 p. La dua parto de *Majstro de la ringoj* (sed la 'tria libro'). £3,80

En barko senpilota: Plena originala poemaro W. Auld; red. A. de' Giorgi. Pizo: Edistudio, 1987. HB, 874 p. £6,00

En maskobalo: Kvin unuaktaĵoj Julio Baghy. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. SB, 141 p. La unuan teatraĵon oni prezentis dum UK en Nurnbergo 1923. £2,30

Ezopa saĝo Kopenhago: 1956. HB, 127 p. Sepdek ses amuzaj fabloj de Ezopo, verse reverkitaj de K. Kalocsay. £2,50

Freŝa mateno Reuven Kritz. El la hebrea tradukis Oto Ginz. Israelo: 1967. HB, 280 p. Historio de juda knabo, kiu rifuĝis en Palestino post la milito. £2,50

Kontralte Marjorie Boulton. La Laguna: Régulo/Stafeto, 1955. HB, 286 p. Impona debuta poemaro de la granda Esperanto-poetino. £3,00; SB. £1,70

Lingvo kaj vivo Gaston Waringhien. Roterdamo: UEA, 1989. 2a reviziita eldono kun apendico. HB, 452 p. Esperantologiaj esejoj. £5,00

La perdita honoro de iu Katarino Blum' Heinrich Böll. Elgermanigis R. Ŝulco. Gerlingen: Bleicher, 1978. HB, 154 p. Rakonto de la fama germana romanisto pri kiel potenco povas estiĝi kaj kien ĝi povas konduki. £2,50

Praktika bildvortaro de Esperanto Oxford Uni. Press, 1979. SB, 87 p. £2,50

Rembrandt, la magiisto M. Miller. Amsterdamo: 1936. HB. Biografio kun multaj nigra-blankaj ilustraĵoj kaj informoj pri pentraĵoj. £2,50

Robinsono Kruso Hago: 1928. SB, 127 p. Legolibro por geknaboj, kompilita de H.J. Bulthuis, kun demandoj je la fino pri teksto-kompreno. £1,80

Sen eliro; La respektama p... Jean Paul Sartre. El la franca tradukis Roger Bernard. Francio: 1964. SB, 111 p. (Dramo *The Respectful Prostitute*). £2,00

La serĉado de la vivo Fujio Egami. El la japana tradukis Kikunobu Matabu. Eminentia sciencisto verkis laŭ vidpunkto de biokemio. Tokio: 1971. SB, 167 p. Tre bonstata. £2,30

Tartarin Alphonse Daudet. Bruselo: Heroldo, 1955. HB 192 p., ilustrita. Romano pri mirigaj aventuroj de Tartarin de Taraskono. £2,50

Vivo de Zamenhof Edmond Privat. La unua biografio de Zamenhof. Londono: BEA, 1923 (1a eld.). HB, 109 p. £2,00. Londono: BEA, 1937 (2a eld.). HB, 133 p. £2,50; SB. £2,00



JEB welcomes a bright, young future

This will be the last article written by me on the JEB page. Indeed, it will be the last article written by any of JEB's current office-holders. The three of us are candidates for EAB's Management Committee. I thought that it might be appropriate to sign off with an appraisal of JEB under our stewardship.

This incarnation of the quinquagenarian JEB stems from the frenetic arrival into *Brita Esperantujo* of a 17-year-old, red-haired ball of energy named Daniel White in early 2006. For years JEB had been quiet. The '90s into the early 2000s saw seven presidents, the latter six claiming 260 members in the organisation, according to UEA *Jarlibroj*. Those figures are suspect, as anyone who was around at the time will know. Indeed, I spoke to one of the *prezidintoj* this morning to ask him, a decade removed from the fact, how many members he thought there were in JEB under his watch. His answer: "I think around 30, but effectively 15 or so."

First 'relaunch'

The first 'relaunch' of JEB that I personally witnessed took place at the 2003 *Brita Kongreso* in Glasgow, in a meeting attended by about ten people. Membership fees of £10 were handed over, and JEB was provisionally back on the right track ... except that nothing much happened afterwards. A website was updated to say that "JEB is getting back on its feet". Unfortunately, aside from an online discussion group, mirroring the then active *Esper-Brit*, there was nothing else, and that website stayed untouched ever after (you can see the site in

its post-Glasgow incarnation at <http://bit.ly/gqQdK5> to get an idea for yourselves). At least the UEA *Jarlibro* for the year showed a more reflective membership figure than the previous decade's, with a much less exaggerated 35.

Core friendship group

There was a core friendship group, which had established itself – with me included – by virtue of attending the 2003 and 2004 *Britaj Kongresoj*, the 2003 IJK in Lesjöfors, Sweden, and the 2004 *Internacia Junulara Semajno* in Miskolc, Hungary – and reinforced in 2005 and '06 by those same people being the only ones to attend JEB AGMs and go on trips together. However, the *visible* signs of activity outside that core group were nil. Only one issue of *Saluton!* had been published, the website remained untouched, and there was no way for people to actively join JEB.

Enter NovaJEB

Enter Daniel White and his NovaJEB in early 2006. By his own initiative he had found out which people of JEB age had completed EAB's free postal course and got in touch with them. Unsurprisingly, they wanted to join an Esperanto association specifically for them, and so was born NovaJEB, complete with website and membership form. He got in touch with me prior to the 2006 *Brita Kongreso* to ask, rather reasonably, that his site replace the untouched official one. I replied to say that I would endorse this, but that I couldn't give the go-ahead without a vote at the upcoming AGM. Daniel

took this well for all of about four weeks, until his patience evaporated (neither of us has it as a strong point) and he announced in the JEB discussion list and to his own members that the old JEB was gone, and there remained "the one and only NovaJEB" as official organ. (It seems that this announcement followed a message informing TEJO that he was the official JEB president, because he's shown as being it for 2007 and 2008!)

Following an entirely predictable conflict, Daniel did indeed make it to the *Brita Kongreso* where he, and NovaJEBano Tom Shorney, joined the official JEB committee. (I ceded my place on it so that the balance swung younger, making my current position of JEB president doubly ironic!) Daniel's website indeed became the official one (in the easiest voting I'd ever seen), and the three of us set about making JEB 'fit for purpose' once more.

Tom took up editorial duty on *Saluton!*, later produced by me and Daniel, and in August of 2006 I created – with technical help from Gavan Fantom – the JEB forums. Now there was a place where outsiders could see that JEB was an active association. There were areas for chat and jocularly, arranging meet-ups, talking about Esperanto-related entertainment, asking questions about the language, a practice area for beginners where, chiefly, I would correct their Esperanto or give them stylistic advice and – the element of which I'm particularly proud – a section "All About Esperanto", which I think provides an ideal starting-point for interested parties (at <http://bit.ly/hApUq0>.)

At 2007's *Brita Kongreso* in Letchworth I became JEB president. We quickly reopened links with EAB, which has served both sides well. We became regular contributors at the annual Language Show, including producing high-quality materials to show Esperanto in the favourable light it merits. A year after the arrival of the forums I created the Jeb-site, a main page on which contributors could write Esperanto-related articles and which would act as a one-stop news-feed on our Esperanto-related activity. *Saluton!* had ceased publication, its role of newsletter outmoded by the strong web presence that we had developed. At some point prior to that I had made the decision to do away with membership fees, since JEB had no costs, and I wanted JEB to be as easily accessible as possible.

The plan seemed to be working. More and more newcomers presented themselves, and JEB attendance at international events increased. There were times when we were the third in the queue for attendance at international events such as the 2008 *Internacia Seminario*, falling behind the German hosts and the Russians, who hitchhiked there *en masse* as part of their holiday tradition.

New faces

With the arrival of Clare Hunter as secretary, JEB gained an affable person who was prepared to put in a lot of time arranging seasonal meet-ups. Regular readers of this column will be aware of these, which have become more and more successful, including 13 people present in London, 22 in Cardiff, and over a dozen at a camping weekend in Brighton. Since the goal was to take JEB into different parts of the country, new faces have had greater opportunities to introduce themselves.

Next meet-up in Newcastle

The next meet-up is set for Newcastle (5–6 March).

Thomas Preece, a 21-year-old committee member, has been working hard behind the scenes speaking with younger members about what they would like to see in JEB.

Promising future

The future looks promising for JEB as, in one fell swoop, a young litter is set to emerge as the old dinosaurs set off to become the new arrivals in EAB. This is how it should be. As the composition of JEB's leadership is in the process of rejuvenating, so is the national association's, with the added bonus that strong links with JEB are already in place.

So, though this is the final goodbye on this page from Clare, Mikeo and me, it's also the precursor for a fresh start from Thomas, Jake, Laura, Alex, Guy, and the other young people

prepared to steer the ship. We wish them every success and enjoyment, as they build on the foundations that we've laid.

Thanks!

I sign off by thanking all whose contributions have made it possible to write such a positive appraisal. Clare arrived as a beginner, the first outsider, and became our most valuable commodity. Mikeo has been involved for half his lifetime, taking charge of the finances. Marteno Miniĥ has attended every JEB event (minus one which clashed with Esperanto work in Denmark). Gavan Fantom hosted our web presence on his own server and helped out with the technical aspects. And, of course, Daniel White, without whose impetuosity JEB might well still be nothing more than a group of friends and a static web page.

Adiaŭ! Tim Owen

Dumonata volontula servo en Tuluzo

Saluton al ĉiuj!

Ĉu vi deziras loĝi malmultekoste du monatojn en Tuluzo, malkovri belegan regionon, ĝui la vivon en vigla kaj agrabla urbo?

Ĉu vi pretas samtempe partopreni Esperantajn aranĝojn kaj foje helpi en projektoplena Esperanta asocio?

- Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo gastigos vin dum majoj kaj junio 2011!
- Nur unu volontulon aŭ volontulinon ni serĉas, malpli ol 30-jaraĝan, nefranclingvanon, kiu sufiĉe bone parolas Esperanton.
- Ni pagos por la loĝado, la manĝoj kaj la vojaĝkostoj en la regiono (kunlima sumo).
- Vi pagos la vojaĝkostojn por veni kaj reiri.
- *Atentu:* Tiu volontula servo ne estos oficiala, ĝi estos interkonsento pri gastigado en Tuluzo kontraŭ helpo al nia asocio.
- Por kandidatiĝi, por pli da informoj: <http://esperanto.toulouse.free.fr/nova/wikini/wakka.php?wiki=PagxoVolontulo>, aŭ skribu al Marion Quenut (respondeculino pri la projekto): esperanto.toulouse@free.fr.

Esperanto Kultur-Centro / Centre Culturel Espéranto,
31 rue Franc, FR-31000 Toulouse.
Tel. 05 61 62 39 48, 06 87 64 75 84.

Redakta noto: Intertempe ĉi tiu anonco eventuale jam eksdatiĝis, sed en tiu okazo eble estos estonta ebleco kandidatiĝi.

• Study Esperanto in the USA

The North American Summer Esperanto Institute (NASK) has changed the format for its 42nd session 2011. Instead of the usual three weeks, NASK will offer a seven-day intensive Esperanto course during the week of the 4th of July holiday (2–10 July). The place – the sunny campus of the University of California at San Diego – remains the same. Everyone, from age 16, is welcome.

For more information, go to <http://esperanto.org/nask>; for prices and payment options, to <http://esperantic.org/en/education/nask>. For registration, scholarships, etc., contact the administrator: Ellen Eddy at eddyellen@aol.com.

• Usona seminario literatura

La seminario okazis en Louisville, Kentucky, la 26an kaj 27an de februaro, sub gvido de Ulrich Becker, poeto kaj eldonisto; Duncan Charters, lingvisto; Humphrey Tonkin, kritikisto; kaj Tim Westover, novelisto. Inter la temoj estis verkado de poezio kaj fikcio en Esperanto, la historio de Esperanto-literaturo, literatura kritiko kaj analizo en Esperanto, kaj tradukado de Esperanto kaj en Esperanton. La seminario parte koincidis kun la 39a Konferenco pri Literaturo kaj Kulturo de la Jaro 1900, organizita de la Universitato de Louisville, kun aparta sesio 'Esperanto-aŭtoroj legas el siaj verkoj'.

• Letter in *The Times*

A letter by Brian Barker appeared in *The Times* on 4 February – 5 column inches on page 29.

• Esperanton studi en Svedio

Somera Esperantokurso ĉi-jare okazos de la 11a ĝis la 16a de julio. Oni planas infangrupon kaj tri nivelojn por plenkreskuloj, kun ĉirkaŭ ses horoj da instruado ĉiun tagon de spertaj internaciaj instruantoj. Post peto

oni sendos kompletan kursoprogramon kun prezoj kaj formularo por aliĝo: Esperanto-kursejo, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. Tel. +46 (0)590-30909, poŝtel. +46 (0)7675455; retpoŝto: egarden@esperanto.se, aŭ rekte al Lennart: kles@tele2.se.

• U3A contact

Eric Walker plans to give a lecture to Suffolk U3A (University of the 3rd Age). He requests that anyone in Britain who is a member contact him (e-mail: ericwalker@gn.apc.org). U3A nationally has specialised sections, and he wonders whether we couldn't get an Esperanto section started (cf. the success of

Pola Esperanto-Asocio in this field, reported below).

• Unikoda redaktilo Simredo 4.3

Simredo estas Ĝava Unikoda redaktilo, kiun kreis Klivo por Vindozo, Linukso kaj Mak. Ĝi estas senpaga kaj libera, praktika por transkodigo de diversaj lingvoj, i.a. Esperanto-tekstoj de 'x'- aŭ 'h'-sistemo al/de Unikodo.

Ĝiaj ĉeftraĵoj estas: • facila instalo por Vindozo, Linukso, kaj Mak OS X • limigita subteno por stilaj dokumentoj (RTF-formato) • konvertado de pli ol 100 signokodaroj al Unikodo • facile uzebla klavmapa funkcio, por ŝanĝi klavarangon • subteno por lingvoj, kiuj kuras maldekstren, kiel la araba • menuoj kaj



• Pola Esperanto-Asocio venkis en Eŭropo por Tria-Aĝuloj

Dum la 10a jubileo de la Programo Grundtvig "Lernado dum la tuta vivo", oni anoncis la rezultojn de la rilata konkurso. Neatendite venkis Pola Esperanto-Asocio en la kategorio "La plej bona organizaĵo".

Programo Grundtvig celas vastan nefakan edukadon de maturaj personoj sur eŭropa nivelo, kaj PEA aktivis inter anoj de la Tria Aĝo, progresante ĉi ties interesiĝojn kaj ambiciojn.

Tiu distingo por PEA tamen ne staras sola. Ilian koleginon Małgosia Komarnicka (*dekstre sur la foto*), kiu eklaboris kiel asistanto en la projekto, oni nomis "la plej bona laboranto dum 10 jaroj de Grundtvig". Ŝi ricevis premion pro la raporto pri sia 10-monata asistanteco en Esperanta Internacia Kultura Centro en Herzbergo, Germanio. Małgosia estas i.a. ankaŭ sekretario de ILEI. Nun oni atendas la eldonon de la libro: *Eŭropaj bonaj praktikoj*, en kiu estos priskribo por eŭropanoj.

"Grandega ĝojo, kontento, fiero", raportis Halina Komar.

mesaĝoj en: la angla, Esperanto, la franca, greka, hindia • literumilo por la angla, Esperanto kaj la latina • kriptigeblo.

Versio 4.3 de Simredo estas nun elŝutebla ĉe: www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/simredo/simredo.

• Dum seminario en Mumbajo

En seminario, okazinta inter la 27a kaj 29a de januaro 2011, en la lingvistika fakto de Universitato de Mumbajo, la ferma parolado de prof. Probal Dasgupta, traktis la temon de la tradukado kiel esenca ekzistokondiĉo por tia multlingva respubliko kiel Barato. En tiu kunteksto, la parolado emfazis la rolon de Esperanto kiel unike efika tradukilo kaj krome kiel aparte klara klarigilo de la semantika strukturo de vortoj, per kiu la homoj povas plibonigi sian komprenon pri la vortosensoj tute ĝenerale.

Diference de la kutimaj kunvenoj de lingvistoj, tiun ĉi ĉeestis pluraj membroj de la nacia intelekta elito, okupiĝantaj pri la historio, sociologio, kulturistiko, kaj la mesaĝo do atingis pli reliefan celpublikon, ol eblis en antaŭaj intervenoj en Barato.

En la koridoraj babiloj, eblis atingi plurajn gestudentojn, kiuj proprainiciate lanĉis interparolon pri Esperanto, kaj esprimis interesiĝon eklerni. Kiel kutime, la respondo estis direkti ilin al la retpaĝaro www.lernu.net. Prof. Dasgupta aldonis rakontetojn pri Sekelj kaj Sinha. Li atentis respondi al specifaj individuoj, kaj tajlori siajn respondojn enhave kaj longece al la grado de interesiĝo.

• JoMo

Estas nova kvarlingva retpaĝaro de la esperantista kantisto JoMo: www.jmleclercq.eu.

• Download PAG

Here's a link for downloading *Plena analiza gramatiko de Espe-*

Nord-Okcidenta Federacio bonvenigas al Preston en majo

Bonvenon al Preston por la kunveno de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio, kiu okazos sabaton, la 21an de majo.

Nia speciala gastparolanto estos s-ino Heather Eason, kiu parolos pri "Denaska Esperantismo: beno aŭ malbeno?" La aranĝo inkluzivos ankaŭ nian jarkunsidon, konversaciajn rondojn, librovendadon, loterion kaj pli.

La kunsido okazos, kiel kutime, ĉe Empire Services Club, Hartington Road, Preston PR1 8PP. Tiu komforta loko estas proksima al la stacidomo de Preston, apud Fishergate Hill.

Por pliaj detaloj kaj por mendi, kontaktu Andrew Wheatley (poŝtelefono: 07543 301467), P.O. Box 103, Lytham St Annes FY8 3GU. Bonvolu diri al Andrew, se vi estas vegetarano.

Seminario en Jorko en junio

La 25an de junio Federacio Esperantista de Jorkŝiro seminario kun Hilary Chapman, kiu prezentos kaj gvidos tuttagan programon en Jorko, ĉe Guppy's Enterprise Club, 17 Nunnery Lane.

Hilary havas fortan intereson pri la historio de nia lingvo. Laŭ

li, la Esperanta popolo bezonas siajn heroojn, siajn malheroojn kaj eĉ siajn mitojn.

Por partopreni, bonvolu kontakti f-inon A.B. Duerden, 1 Grove House Drive, Bradford BD2 4DS. Tel. 01904 627029. La kosto estas nur £12.

ranto (1985) by Kalocsay kaj Waringhien: <http://e-novosti.info/forumo//viewtopic.php?t=6265>.

• Komputila programado

Interesitoj pri programado povas interŝanĝi ideojn kaj spertojn, plani projektojn, i.a. tradukojn de programoj, en la forumo <<http://programistoj.net/forumo/viewtopic.php?f=3&t=2>>, kiun kreis kaj administras Vilius Normantas. (Informis Ret-Info, Budapeŝto.)

• Utilaj kolektoj el Ipernity

Kelkaj utilaj kolektoj por esplorado: Dokumenta Esperanto-Centro de Josip Pleadin: www.ipernity.com/user/dokumenta.esperanto.centro; dek mil fotoj pri Esperanto el la interreto de Bernardo Maurer: www.ipernity.com/blog/37943/295571; Galerio de Marian Vochin el Rumanio: www.ipernity.com/doc/m.vochin/ album ; 117 albumoj de Pedro Hernández – impona kolekto de

New Members of EAB

Audrey Deal, Dagenham
J. Hill, St Peter Port, Guernsey
J.C. Kemp, Kettering
Marteno Miniĥ, Willesden
Richard Phillips, Droitwich
Thomas Preece, Beeston
Keith Wood, Wednesfield
Frances Worrall, London

Deceased members

Vera Hartley, Didsbury
Desmond James, Pembroke Dock

CONGRATULATIONS


Completed the Free Postal Course

Paul Hankinson, Alsager

Exam success

Penny Nicholas, Basildon:
Intermediate with distinction
Guy Rawson, Coventry:
Elementary with distinction
Simon Richards, Portadown:
Elementary

La eta princo de Saint-Exupéry: www.ipernity.com/doc/pedroesperanto/album/128355. □



Lingvo kaj menso de Noam Chomsky estas kolekto de revoluciaj eseoj el 1967 pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio, biolingvistiko.

La serio Sciencna Penso strebas, sub la aŭspiciado de UEA, evoluigi la ĉeeston de tiu branĉo de la sciaro en la Esperanta librokulturo. Ĝi stimulas la lingvokultivan tradukadon de gravaj natur- kaj soci-sciencaj verkoj, jen mejloŝtonaj el historia vidpunkto, jen elstaraj kiel altnivela sciencpopulariga literaturo, jen kontribuaj al la kompreno pri la scienco kiel plurala dimensio de la kulture same plurala homa civilizo.

Kiel dua volumo de la serio, jen unu el la plej gravaj verkoj de la moderna lingvoscienco.


Bonŝance, ni povas profiti je la lingva lerteco de la tradukinto kaj je la gvida aliro al la verko de elstaraj fakuloj. Interese, en siaj respektivaj antaŭparolo kaj enkonduko, ili sukcesis tuŝi gravajn aspektojn de la lingveco kaj signifo de Esperanto laŭ iuj elementoj de la intelekta tradicio lanĉita de Noam Chomsky.

Lingvo kaj menso de Noam Chomsky. Tradukis Edmund

Grimley Evans. Antaŭparoloj de Probal Dasgupta kaj Hiroshi Nagata.

Rotterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2010. 188p., 21 cm. ISBN 978-92-9017-114-0.

Mendu de EAB kontraŭ £8,20. Bonvolu aldoni 15%ojn por sendokostoj – minimuma poŝtkosto estas £1,50. Bonvolu skribi ĉekojn al 'EAB' aŭ telefonu al la Esperanto-Domo per 0845 230 1887 por aĉeti per debeta (aŭ kredita) karto.



Ĝisdatiĝu per

John C. Wells

English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studentoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto

Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfonto por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio: ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj

(xlvi + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: www.librejo.com/wells-vortaro.

- **Vendopreztoj ĉe EAB:** La broŝurita eldono kostas £16, la bindita £29, plus sendokostoj po 15%. Reta butiketo: www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary – aŭ telefonu al 0845 230 1887.